

Kial ne fakaj kongresoj ?

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 523, 1981.10.15 & 17

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Alvenis la aŭtuno, kaj kun ĝi la laŭdegaj kongres-raportoj. En tiuj ĝenerale ditirambaj tekstoj ni provas diveni, kio fakte okazis en tiuj amas-kunvenoj, krom la festaj aranĝoj, la ekskursoj kaj la iom elasttemaj kunsidoj.

A.- Por ricevi iom objektivan ideon pri la influo de tiuj kongresoj sur la esperanto-vivo ĝenerale, oni foje relegu la raportojn aperintajn dum la dudek pasintaj jaroj.

Cl.- Tion ĉi ni amuziĝis fari, kaj ni ricevis la senton, ke fakte ĉiam la samo okazas, ke ĉefe originalan noton alportas la loko mem, kie disvolviĝas la aranĝo, ke ni troviĝas antaŭ folklor-tradicio profunde enradikiĝinta en la esperanto-socio. Eĉ la esprimo kongreso, por tiuj renkontiĝoj estas esperantismo.

A.- Tiu ĉi relego de malnovaĵ kongres-raportoj ankaŭ donas la impreson de dinamismo pli parola ol reala, de vasta ludo kiu disvolviĝas en granda ĝojo kaj kun pardonemo al la individuaj mankoj: oni aplaŭdu la artistojn, eĉ se ili estas tre amatoraj, oni lasu la verajn decidojn por la eksterkongresaj kunvenoj aŭ al la perkorespondaj debatoj, kaj tie ĉi oni optimisme priskribu la situacion.

Cl.- Kurante ĉien, babilante kun ĉiuj, vizitante kuriozaĵojn geografiajn, kastelojn, vinkelojn kaj eĉ urbestrajn ceremoniojn, oni ne havas la tempon enprofundiĝi en preciza temo. Por tio ekzistas fakuloj kaj ilian kongresan rezolucion oni entuziasme akceptos, eĉ se ĝin oni ne bone komprenas.

A.- Kelkaj geaŭdantoj pensas: oni vidas, ke gesinjoroj Gacond ne travivis la Brazilian aŭ la Bazelan aventuron. Tiam ili ne parolus tiel karikature.

C1.- Mi tamen ĉeestis dum unu tago kaj kvarono la ĉi-jaran SAT-kongreson en Bazelo, kaj tiu restadeto konfirmis mian impreson, ke pli temis pri popola festo ol pri vera kongreso. Krom la emo renkontiĝi por praktiki la zamenhofan lingvon, mi ne kapablis malkovri la veran celon de tiu ĉi aranĝo.

A.- Tiu ĉi konstato devas komprenigi, ke la esperanto-kongresoj ĉu de SAT aŭ de UEA, pri kiuj oni ĉefe raportas en la propagandiloj pri esperanto, ne estas kongresoj, kiuj provas pritrakti temon, solvi problemon. Ili estas amas-renkontiĝoj.

Cl.- Ni facile agnoskas tion, sed ni bedaŭras, ke pro la ekzisto mem de tiuj kongresoj, esperantujo ne interesiĝas pri la nefolkloraj aranĝoj, kiuj celas precizan temon. Ne povis ĝis nun instituciigi tiaj kongresoj, kiuj povus esti utila komplemento al la kongresoj, kiujn ni konas.

A.- Povas esti, ke la almenaŭ ŝajne stagna situacio, kiun ni konas rilate al la disvolviĝo de esperanto, estas kaŭzata de tiu tre karakteriza maniero kongresi, kiu komencigis antaŭ 75 jaroj en la Universalaj Kongresoj de Boulogne-sur-Mer, Genève kaj Cambridge. Tiuj festoj kunigis ĉiujn alkurintojn en kreskanta entuziasmo, kaj jaron post jaro oni revekas tiun ĉi entuziasmon.

Cl.- Tamen ni opinias, ke ni devas kompreni, kiam nia lingvo baldaŭ fariĝos centjara, ke tiun ĉi jubileon ni pretigu per vera analizo de la hodiaŭaj bezonoj. Ni tiam rimarkos, ke esperanto ne konkeros firmajn poziciojn en fakaj medioj, en la lernejoj, en interŝtataj institucioj, se ni mem ne serioze kongresos, en la kadro de institucioj kiuj precizigos pli kaj pli siajn celojn.

A.- Ni donu kelkajn ekzemplojn:

Cl.- Kial kongreso ne dediĉus sian atenton al la vortaroj, ekzamenante ne nur la kvalitojn kaj mankojn de tiuj kiuj havas la honoron ekzisti, sed provante ankaŭ instigi la naciajn kaj internaciajn esperanto-societojn finance kontribui favore al la eldono de pli bonaj vortaroj. Tiom longe kiam tiuj iloj ne ekzistos, estos malfacile konvinki la mondorganizaĵojn listigi esperanton inter siajn labor-lingvojn kaj la instru-ministeriojn favori la enkondukon de la esperanto-instruado en la lernejoj.

A.- Kial alia kongreso ne kritikus la lernolibrojn, profite al la plej taŭgaj kaj favore al la ellaboro de metodologiaj normoj universale akceptebiaj.

Cl.- Ĉiuj naciaj societoj baraktas en la samaj problemoj, koncerne la reformon de siaj ekzamenaj normoj. Kial kongreso ne povus interesiĝi pri tiuj ĉi demandoj?

A.- En UNO kaj en ties fakaj organizaĵoj oni debatas pri tre gravaj demandoj, kiuj koncernas nin ĉiujn. Kial kongreso ne povus preni kiel temon la tagordon de UNO aŭ de unu el la fakaj mondorganizaĵoj, por esprimi ne la vidpunkton de la registaroj, sed tiun de la popoloj. Povas eĉ esti, ke ONU ekatentos pri esperanto, kiam tia kongreso regule kunsidos.

Cl.- Ni devas konsideri kongreson kiel institucion. Tiel estas por la Universala Kongreso. Ĉiujare ĝi okazas laŭ precizaj reguloj kaj en specifa etoso. Same devus esti koncerne pli fakaj kongresoj.

A.- Okazis ĝis nun nur du kunsidoj de la Internacia Konferenco pri la Instruado de Esperanto en la Lernejoj, tio en Genève en 1922 kaj en Praha en 1927. Ĉu ne estus inde kaj utile labori al la rekunvoko de tiu ĉi Konferenco?

Cl.- La pasintan semajnon ni kritike recenzis la Rezolucion akceptitan en la Universala Kongreso en Brazilio. En sia longega frazo 251-vorta ĝi havis nenion konkretan por diri. Ni estas certaj, ke kiam pere de veraj kongresoj la esperantistoj realisme rigardos la situacion alfrontotan, iliaj kongresaj resolucioj refariĝos legeblaj. Kaj la grandaj festaj kongresoj de UEA, de SAT aŭ de aliaj esperanto-asocioj akiros novan signifon: ili povos informi la esperanto-popolon pri la analizoj kaj decidoj de la fakaj kongresoj.

A.- Inter tiuj ĉi fakaj kongresoj ni esperas, ke foje unu el ili renkontigos la radio-redaktorojn, inter kiuj interŝanĝoj de programoj povus okazi. Tiaj aranĝoj ne povas disvolviĝi en la kadro mem de niaj festaj kongresoj. Ili devas instituciigi aparte.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond donis sian vidpunkton koncerne la esperanto-kongresojn. Ĝis reaŭdo!